

La Animo estas Simfonieca

Kial la animo estas simfonieca

Meditinstigaj notoj kun la Kantoj de Hildegarda el Bingen

de Alberta kaj Enrica Manni



Flamoj envolvas Hildegardan, brodita littuko

Vokiĝo de Hildegarda rakontata en Scivias

PROLOGO

Hildegarda el Bingen estas monto grimpinda malrapide dum la jaroj, tra multaj padoj, prefere se ŝnurligite kun fidelaj vojaĝkunuloj.

Al ĉiu el ni, kiuj komencis ĉi tiun vojaĝon, ŝi prezentiĝis per nomo malsama.

Hildegarda Homo Simplex

En la jaro 1140, je la aĝo de 42 jaroj kaj 7 monatoj, Hildegarda ricevis de la Vivanta Lumo la ordonon skribi tion kion ŝi vidis kaj aŭdis ekde la plej eta infanaĝo. Per la longa redakto de ŝia unua teologia libro, la *Liber Scivias*, komenciĝas la publika vivo de Hildegarda, ekster la muroj de la monaĥejo. *Incipiat Scivias Hominis Simplicis* (Komenciĝas Scivias de la Simpla Homo). La unua libro kaj ĉiuj postaj verkoj – kaj ili estas ja multaj – kiujn ŝi skribos dum 40 jaroj, helpate de monaĥo Volmar kaj de siaj kunfratinoj, havas titolon sekvtan de la aŭtoro: la simpla homo. Ne ja la nesukcesinta homo kia estas la virino ekde la antikva epoko ĝis la mezepoko, kaj kun malŝato konsiderata eĉ nun. Simple kaj, komplete, Homo.

Hildegarda Doktoro de la Eklezio

La sepan de oktobro 2012 Benedikto XVI proklamas Hildegardan el Bingen Doctor Ecclesiae. Ŝi estas la kvara virino dum dumil jaroj da historio kiu ricevas la titolon Doktoro, kiu signifas “scianto pri la aferoj diaj kaj kune homaj”.



Tapeto elmontrita en la baziliko de Sankta Petro por la proklamado de Hildegarda Doctor Ecclesiae

La tago de la liturgia memoro de Hildegarda estas la 17a de septembro, ŝia Naskiĝa tago, ŝia naskiĝo al la ĉielo. Ĉe la komenco de la rilata Meso la Eklezio ŝin memorigas tiel:

“Ŝi naskiĝis en Bermesheim, en Germanio, en la jaro 1098 kaj en 1115 ŝi eniris en la benediktanan abatejon de Disibodenberg. En 1150 ŝi fondis la monaĥejon de Rupertsberg apud Bingen, kaj ĝin direktis estiel abatino. Personeco plurfaceta, filozofino, teologino, profetino, spertulino pri natursciencoj kaj muzika arto, ŝi havis la donacon de la mistika kontemplado kaj esprimis siajn viziojn en pluraj skribaĵoj. En la jaroj de la maturaĝo ŝi entreprenis plurajn vojaĝojn por viziti monaĥejojn kaj prediki en la placoj la penton kaj kontesti la erarojn kontraŭ la ĝusta doktrino. Al ŝi turniĝis por konsiloj princoj kaj papoj. Ŝi mortis la 17an de septembro 1179. Papo Benedikto XVI ŝin dekalris Doktoro de la Eklezio la 7an de oktobro 2012”.

Hildegarda Profetino

La Doktoroj de la Eklezio ofte havas kromnomon, kiu sinteze priskribas ilian karismon. Francisko estas la Serafulo, Bernardo la Mielfluulo... Hildegarda estas la Profetino.

Ĉiuj kristanaj baptitoj iĝas, tra la Spirito, sacerdotoj, reĝoj kaj profetoj. Kelkaj interpretas sian bapton rolon de enmergiĝo en la Realon laŭ maniero pli konkreta kaj, kiel en la kazo de Hildegarda, politike grava. Kaj ni uzas vorton “politike” en ties propra signifo, je la servo de la *Polis* (urbo), de la homa komunumo establiĝinta en specifan teron.

“Neniu estas profeto en sia urbeto”. La profeto parolas al sia popolo donante voĉon al mesaĝo forta kaj kelkfoje obskura. La profeto estas ofte miskomprenata, izolata, silentigata. Ne tiel Hildegarda el Bingen. Dumvive ŝi estas konsultata kiel aŭtoritateca Profetino de teologoj, responsuloj de komunumoj, ordinaraj personoj, regantoj, papoj kaj tuj post la morto ŝi estas kultata kiel *famosissima prophetissa Novi Testamenti, cum qua familiariter locutus est Deus*, “la fama profetino de la Nova Testamento, kun kiu Dio parolis kiel al familiano” (En *Acta Inquisitionis* de 1223, la dokumentoj de la kanoniza procedo tuj komencita kaj poste lasita sen atento dum 900 jaroj).

Monaĥo Gilberto el Gembloux (1124-1213), ekkonas Hildegardan dum la lasta jardeko de la longa vivo de la sanktulino, kiam ŝi estis ankoraŭ engaĝita en la redakto de la *Liber Divinorum Operum* (Libro de la Diaj Verkoj), verŝajne ŝia teologia ĉefverko, kaj ĝi estas la unua kiu apudigas Hildegardan al la grandaj bibliaj profetinoj kiel Miriam kaj Deborah.

“Kantu al la Eternulo/ ĉar Li alte leviĝis:/ ĉevalon kaj ĝian rajdanton Li ĵetis en la maron” (Eliro 15, 21) estas la kanto de venko sur la faraono, liaj ĉaroj kaj liaj kavaliroj, kiun Miriam, fratino de Moseo kaj Aharono, ekkantas por kantigi la tutan popolon de Izraelo, kiu trapasis seka la Junkan Maron.

La profeto kantas kaj akompanas la historian okazaĵon, legante por la popolo la eventon ene de iu ekonomio de saviĝo. La vivo iĝas laŭdo al Dio. La profeta kanto estas ĉe la origino de la biblia profetaĵo kaj la muziko estas tio kio restas el la profetaĵo kiam la profeta inspiro de Izraelo finiĝas (komparu Alberto Mello, *Chi è Profeta*, eld. Qiqajon, 2014, p. 73).

La profeto kantas. *Quia symphonialis est anima*. Kial la animo estas simfonieca.

Hildegarda la Sibilo de la Rejno

Joyce Lussu parolas tiel pri la sibiloj:

“Ĉi tiu bildo de virino saĝa kaj serena, kiu amas la vivon kaj la personojn, kiu kolektas kaj gardas la konojn, por ke ĉiuj povu maturigi ties florojn kaj fruktojn, kiu ne bezonas fari el sia scienco sekreton kaj el sia aŭtoritato fortikaĵon defendendan per la armiloj, estas la simbolo de alia elekto de civilizo kaj kunvivado, tenaca memoro pri socio sen milito kaj sen servistoj regataj de teruro”.

Neniu misteroj, neniu malklaraj respondoj. La sibilo estas Longjara Maljunulino, iu oldulino dediĉita al sia komunumo, politike aktiva, atenta pri la korpa kaj spirita sano de tiuj vivantaj apud ŝi. La oldulinoj, ofte vidvaj, estas virinoj liberaj; ili estos la plejmulto de la sorĉistinoj, kiuj dum jarcentoj brulos sur la ŝtiparoj de tuta Eŭropo, kaj aparte, kiel sorĉistinoj, en Germanio. La demono, kiu konas la veron kaj torturas jam de sep jaroj Siegewize, la nobelinon mensmalsanan kiu estas sendita al la monaĥejo de Hildegarda por resaniĝi, nomas prave sian kontraŭulinon Hildegardan, Scrumpilgardis, tio estas Hildegarda la Faltulino.

Hildegarda patronino de la Kreivuloj

La tre riĉa kaj varia listo da verkoj alveninta ĝis ni povus eĉ sole pravigi la kromnomon. Sed Hildegarda ne amas la polvon de la bibliotekoj, aŭ la anatomiajn tablojn de la akademia studio.

La tekstoj, la kontoj, la bildoj, la parfumoj, la vortoj-aĵoj, ŝiaj vortoj-korpo, postulas de ni la uzadon de la kvin sensoj ne ja por memori aŭ aktualigi foran pasintecon. Hildegarda estas “tubjo” de la Lumo Vivanta. Se ni estas en la ludo ni eniras dimension vertiĝe sentempan, ni vivas sperton ĉi tie kaj nun de Reallo.

La kreivo de Hildegarda estas genera kaj senmorta, kiel la ĉeloj de Henrietta Lacks, kiuj daŭre reproduktiĝas en la laboratorioj de la tuta mondo je avantaĝo de esplorado.

Je distanco de jarcentoj, kiu ekkontaktas Hildegardan ŝargas la piloĵn de la propra flanko penso, defias la novigon, sin engaĝas en la kreiva produktado, kaj manlabora, kaj specife arta.

Hildegarda mistika,

Hildegarda kuracisto,

Hildegarda natursciencisto,

Hildegarda kreantino de eksterordinaraj bildoj,

Hildegarda komponistino de neniam aŭdita muziko,

apenaŭ klasebla en la granda tradicio de la gregoria kanto.

Eble estas pli bone lasi al ŝi la vorton, prefere ol multobligi la stereotipojn.

Kiel oni agu per siteleto por kolekti la akvon de la maro?

Je alta aĝo, ĉe la fino de sia longa kaj, je nia bonŝanco, konscia kaj saĝa vivo, Hildegarda sin rakontas, kiel ŝi estis humile farinta plurfoje.

“Povra ina formo”



Detalo de la tabulo de la Unua Vizio, Parto Unua, el la Liber Divinorum Operum

Manuskripto “Mansi” 1942, Ŝtata Biblioteko de Lucca

Jaro 1173

Hildegarda estas proksimume 75-jara, estas maljuna kaj kiel ĉiam tre malsana, kiam mortas ŝia amika kaj fidela sekretario Volmar, kunulo dum tuta vivo. Kun la helpo de Ludovico de Sant’Eucario kaj de la nevo Wezelin ŝi komencas kompletigi sian trian teologian libron, ebla sian ĉefverkon, la Liber Divinorum Operum.

La lastaj paĝoj, je la konkludo de la transskribo de la longa mesaĝo de Dio, de kiu Hildegarda estas “tubjo”, estas spirita biografio kaj la tono estas eĉ pli trista ol aliloke.

La teksto estas ĉerpita el la itala kritika eldono en la traduko de Michela Pereira, “Il Libro delle opere divine”, Ildegarda di Bingen, I Meridiani Paperbacks, Mondadori, 2014.

“Kaj ree mi aŭdis voĉon el la ĉielo, kiu ordonis al mi diri tiel: nun estu laŭdo al Dio en lia verko, tio estas en la homo, por kiun rekuperi li batalis sur la tero grandajn batalojn (a), kaj kiun li degnis levi

al la ĉielo por ke tiu, kune kun la anĝeloj, laŭdu lian vizaĝon (b), agnoskante la unuecon de la vera Dio kaj de la vera homo.

Kaj Dio ĉiopova degnu oleumi per la oleo de la mizerikordo ĉi tiun povran korpon de virino (c) tra kiu li diktis ĉi libron, ĉar ŝi vivas sen ia ajn sekureco; kaj ne havas la scion (d) por konstrui la skribaĵojn, kiujn la Sankta Spirito sugestas por instrui la Eklezion, kiuj estas kiel la muroj de granda urbo (e). Ekde la tago de sia naskiĝo ŝi estis envolvita en la doloroj kaj en la malsanoj kiel en reto, kaj en ĉiuj vejnoj, en la medolo de la ostoj kaj en la karno ŝi estas turmentata de senpaŭzaj doloroj; kaj tamen Dio ĝis nun ne permesis, ke ŝi estingiĝu, ĉar en la kaverna de la racia animo (f) ŝi vidas spirite kelkajn el la misteroj de Dio.

La vizio fluas tra ĉiuj vejnoj de ĉi ina homa kreitaĵo tiel ke, kaŭze de ĝi ŝi estas ofte skuegata de grandaj doloroj kaj suferas en la turmento de la malsanoj, kvankam kelkfoje en maniero malpli grava kaj kelkfoje en maniero pli suferiga. Tial ŝi vivas en maniero malsama de la pli granda parto de la homaj estaĵoj, kiel infanino, kies vejnoj ankoraŭ ne estas plenaj, tio okazis al ŝi por ke ŝi povu juĝi la vivon de la homoj.

Ŝi plenumas sian taskon pro inspiro de la Sankta Spirito. Ŝi estas el korpo aera (g); tial la aero mem, la pluvo, la vento kaj ĉiu ŝanĝiĝo de la vetero ŝin ĝenas je tia punkto, ke ŝi neniam povas sin senti sekura pri sia korpo: se ne estus tiel, la inspiro de la Sankta Spirito ne povus loĝi en ŝi. Sed la spirito de Dio pro la forto de sia kompato kelkfoje ŝin levas de tiu ĉi misfarto kvazaŭ ŝin revivigante de la morto, kun malstreĉiĝo kiu estas kiel roso, por ke ŝi povu vivi en la mondo kaj plenumi sian taskon inspirata de la Sankta Spirito. Fakte Dio ĉiopova, kiu konas la turmenton de la sufero (h) de ĉi tiu homa kreitaĵo, degnas meti en ŝin la plenumon de sia graco, por ke lia mizerikordo estu glorata kaj la animo de ŝi, kiam ŝi foriros el ĉi tiu mondo, estu akceptata de lia pardonemo en la eterna gloro kaj estu kronata en la ĝojo.

La libro de la vivo, kiu estas la skribaĵo de la vorto de Dio per kiu ĉiu kreitaĵo venis al la ekzisto kaj el kiu ĉiu vivo estis emanata laŭ tio kiun la volo de la eterna patro estis en si antaŭordigita, diktis kiel al li plaĉis ĉi skribaĵon en maniero mirinda, ne utiligante la doktrinon de la homa scienco, sed pere de virino simpla kaj neklera.

Do neniuj aŭdacu ŝanĝi eĉ unu vorton de ĉi tiu skribaĵo, nek ĝin pliigante nek ĝin malpliigante, por ne esti forstrekita el la libro de la vivo kaj el ĉiu beateco ekzistanta sub la suno, krom se temus pri klarigo de la vortoj kaj de la frazoj kiuj estis eldiritaj tute simple, pro inspiro de la Sankta Spirito. Kiu provos agi alimaniere sciu, ke li pekas kontraŭ la Sankta Spirito. Kaj do ĉi tiu peko estos al li pardonita nek ĉi tie nek en la transmondo (i).

Kaj nun denove estu laŭdo al Dio ĉiopova en ĉiuj liaj verkoj, antaŭ ĉiuj jarcentoj kaj en ĉiuj jarcentoj, ĉar li estas la komenco kaj la fino.

Ĉi tiujn vortojn la fideluloj akceptu kun koro devota, ĉar ili estis diktitaj por la bono de la kredantoj far tiu kiu estas principo kaj fino”.

Hildegarda estas baldaŭ konkludonta sian surteran pilgrimadon, kaj sian tute personan Imitadon de Kristo.

Kun timo kaj tremo mi glosas per la literoj de la alfabeto humile ĉi ŝian tekston.

“Certe, Certe, Certe”. Certe la renkontiĝo kun Hildegarda estos nur parta.

Certe Hildegarda mem trovos la manieron malfermi aliajn padojn.

- (a) Hildegarda estas lasta el 10 gefiloj de familio de la malgranda rejna nobelaro kaj ŝia nomo signifas ĝuste “tiu kiu batalas”, kontraŭ la diablo, la kataraj herezoj, por la renovigo de la eklezio, por ĝoja monaĥa vivo.
- (b) La muzika teologio de Hildegarda estas verŝajne la kulmino de ŝia teologia mesaĝo. Adamo en la tera paradizo konas la lingvon de la anĝeloj kaj post la falo ilia simfonieca animo senĉese klopodas reveni por laŭdi senĉese la vizaĝon de Dio. Hildegarda estas ankaŭ rafinita muzikistino: ŝi komponas pli ol 70 Kantojn en gregoria unutona stilo absolute originala, kaj en la melodioj kaj en la tekstoj.
- (c) Povra virina formo. Ĉi tiu estas la lokucio ofte uzata por paroli pri si. Virino fragila, markata de la malsano, ne nur iu kreitaĵo, “homo” kiel aliajn fojojn ŝi sin prezentas. Vortoj entenantaj grandan konscion pri si, pri la vera grandeco de la propra malforteco.
- (d) Hildegarda verkas preskaŭ 400 leterojn al papoj, abatoj kaj abatinoj, imperiestroj, nobeloj, kunfratinoj, ordinaraj personoj, respondante akurate kaj ĉiam inspirate de la Sankta Spirito al la diversaj petoj pri spirita instruado por la vivo eterna kaj por la praktika vivo ĉiutaga. Ŝi skribas per la sama zorgo per kiu ŝi kuracas efike estiel kuracisto kaj sperta sciencisto la korpojn de la kunfratinoj, de la pilgrimantoj kaj de la komunumo malsana kaj suferanta kiu sin turnas al la monaĥejoj de ŝi fonditaj. La religia komunumo de cenobitoj, supozeble aŭgustenanoj, *Congregatio Unniensis Coenobii* (el Hünningen en Alsaco aŭ Hunsrück en Ravensburg), ekzemple, petas de ŝi “memorigan notaron” de la Regulo de Sankta Benedikto kaj skribas “se vi volos respondi /.../ kaj se vi volus interpreti por ni la tutan Sanktan Skribon, nenion vi povus oferedoni al ni, kiu estu same utila al ni kaj de ni same aspirata kiom iun vian elmontron de la Regulo”. En maniero klara kaj malavara Hildegarda respondas per malgranda kaj altvalora traktaĵo, la *Explanatio Regulae Sancti Benedicti*, kiun ni konsilas al tiu kiu volas ekkoni la teologian kaj benediktanan sciencon de Hildegarda.
- (e) La fortikstruktura abatejo de Montecassino estas ĝuste konkreta bildo de la muroj de “ĉi tiu granda urbo”, kiu ne nur popolas la viziojn de Hildegarda, sed inspiras la fondon de ŝiaj monaĥejoj.
- (f) Hildegarda ĉiam nomas sin mem “neklara”. Oferite malgrandaĝa al la monaĥejo de Disibodenberg, ŝi ne estis ricevinta edukiĝon pri dialektiko, gramatiko, retoriko, aritmetiko, astronomio, gometrio, muziko, sed laŭgrade estis alirinta altvalorajn tekstojn spiritajn, filozofiajn, sciencajn, kaj estis certe tre klera. Ĉi tiu preciza platona citaĵo estas “facile” komprenebla. Ŝiaj skribaĵoj estas remburitaj de la situacio de la artoj de la okcident-eŭropa kulturo. Ni ne konas multajn el ŝiaj fontoj, sed tiuj kiujn ni konas estas vastaj kaj ankaŭ nekonvenciaj. Ŝia sinnomado “neklara” ne estas falsa modesteco, sed vera verproklama kuraĝo: la scienco, kies proparolantino ŝi estas, ne estas ŝia, sed “enblovita” en ŝian animon far la Lumo Vivanta.
- (g) La kolonoj de la ventoj blovataj de la Sankta Spirito subtenas kaj vivtenas la Universon kaj la Homon. La teologio de Hildegarda estas spirita, la Sankta Spirito en ŝiaj vizioj estas tre pli multe ol eta kolombino. En iu ekumena dialogo inter okcidento kaj oriento en Hildegarda oni trovas multajn interesajn elementojn sugestitajn de la Spirito.

- (h) Hildegarda pasigas la plej grandan parton de sia vivo en la lito, tre malsana. Periodoj de pliboniĝo alternas kun longaj semajnoj de korpa senmoveco. Estis ja multaj la kuracistaj hipotezoj faritaj pri ŝiaj doloroj. Ŝia persona interpreto estas tre lucida: ili estas donacoj de la graco, nepraj vundoj ĉar ŝi estis trairata kaj enloĝata de la Sankta Spirito. La kulto de la korpo kaj de la sano, de kiuj bedaŭrinde Hildegarda estas celtabulo hodiaŭ kiel ikono de aliroj sanigcelaj, estis kiel eble plej malproksimaj de ŝia sperto kaj de ŝia volo. La ĝojo kaj la zorgo pri la korpo, kiun Hildegarda sendube praktikas kiel kuracisto, patrino, magistro, herboterapiisto, benediktano de la “prudenta komprenkapablo” kaj malproksima de elĉerpaj asketaj praktikadoj, estas io tute alia.
- (i) La lingvaĵo de Hildegarda estas apokalipsa, biblia, ofte malnovtestamenta. Hildegarda vidas vortojn kaj aŭskultas viziojn (ĉiam viziojn kaj vortojn, vortojn, muzikon kaj viziojn kiuj enplektas la 5 sensojn) verŝajne en la latina, ne ja en la germana, ŝia hejma lingvo. Hildegarda estas kiel sur Sinajo, kie Moseo kaj la popolo “vidas la tondrojn-vortojn” veni el la buŝo de la Ĉiopova.

La 17an de septembro 1179, iun dimanĉon je la krepusko, Hildegarda ĉirkaŭata de siaj kunfratinoj revenas en la sinon de la Triunuo. Du ĉielarkoj interkruciĝas en la ĉielo kunigante la kvar ĉefpunktojn kaj ege brila lumo, kie splendas kruco, aperas ĉe la zenito.